# NIA PONTO

| | |
|---|---|
| Grupo Esperantista | Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.) |
| Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre | ☎ 619.694.683 (Iciar) |
| 48005-BILBAO (Hispanio) | ☎ 658.709.087 (Jesús) |
| Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es) | esperantobi@gmail.com |
| TTT-ejo: esperantobi.tk | |


**Jar-kotizoj**: Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**NOVEMBRO/DECEMBRO 2011** **Nro. 89 (4/11)**





## FIESTA DE ZAMENHOF - ZAMENHOFA FESTOTAGO.

Como ya es tradicional, el **sábado 17 de Diciembre**, a partir de las **19:30** h., celebraremos el aniversario del nacimiento del creador del Esperanto, Ludwik Lejzer Zamenhof (Bialystok, 15/12/1859 – Varsovia, 14/04/1917).

Nos reuniremos en el Grupo, nos reencontraremos con viejos amigos y compartiremos una mesa bien surtida con la comida aportada por los participantes.

Todos estáis invitados, así como vuestros familiares y amigos.

La venontan **sabaton 17-an de decembro**, je la **19:30 h**. kiel tradicie, ni renkontiĝos en la sidejo de nia E-Grupo por festi la naskiĝdatrevenon de la kreinto de Esperanto. Estos bona okazo por paroli E-on kaj revidi malnovajn geamikojn.

Ni atendas vin ĉiujn kaj, kompreneble, ankaŭ viajn familianojn kaj geamikojn.

**LOKE ...**

## Jam estas ĉi-tie la kristnaska loterio.




Jam eblas aĉeti la kristnaskan loterion de nia E-Grupo. Ĉi-jare estas kelkaj diferencoj: unue, la aspekto de la biletoj iom ŝanĝis; due, la prezo: ĉiu bileto kostos 5 eŭrojn, el kiuj, 4 estas por ludi loterion kaj 1 estas mondonaco al nia asocio.

## CUOTAS DEL AÑO 2011.

Si a la izquierda de estas líneas aparece una cruz roja, es que no has pagado la cuota de socio del presente año 2011. Por ello, más que nunca, dadas las dificultades económicas por las que atraviesa el Grupo, a causa de la colocación de un ascensor en el inmueble, te rogamos que la hagas efectiva a la mayor brevedad posible.

Te recordamos que las cuotas vigentes son:

Cuota normal: 30,00 euros anuales.
Cuota reducida: 15,00 euros anuales.
Cuota familiar: 45,00 euros anuales.

¡¡Muchas gracias por tu colaboración!!

## Du japaninoj vizitis la E-Grupejon.




La vendredon 5-an de aŭgusto, du japaninoj vizitis nian sidejon. Ili venis el UK en Kopenhago kaj deziris viziti amikon de Bilbao. S-inoj Toŝiko Hotta kaj Sinobu Kamamura rakontis al ni pri la movado en Japanio kaj regalis nin per verda teo. Reciproke, ni invitis ilin trinki bieron ene de la malnova kvartalo.

Dum ilia kelktaga restado inter ni, esperantista amiko akompanis ilin viziti diversajn lokojn de nia regiono : Gernika, Portugalete, Gugenhejma Muzeo, k.t.p.

## TTT-ejo de la E-Grupo de Bilbao.

Dank' al senlaca laboro de nia amiko Paco López, la TTT-ejo de la E-Grupo jam viziteblas en la adreso esperantobi.tk.

## KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ, ...

27 dec./03 jan. (mardo ĝis mardo). 10-a Novjara Renkontiĝo (NR), en Bitburg (Germanio). Informoj: http://www.esperantoland.org/nr/

22/24 feb. 2012. Esperanto-konferenco en Alikanto, Hispanio. Esperanto, kulturo, librobazaro, feriado. Antaŭ- (18-19 feb.) kaj postarangôj (25-26 feb.). Inf.: Verde Vivi, Querstr. 11, DE-66287 Quierschied, Germanio. drfjd@web.de

5/8 apr. 2012. Iberia Renkontiĝo, kune organizata de la junularaj asocioj de La duoninsulo, okazos dum paska semajno en la apudlisbona ĉemarklifa fiŝhavena kastelurbeto Sezimbro (Sesimbra).

27 apr./ 1 maj. 2012. 71-a Hispana Kongreso. Almagro (Ciudad Real).

16/20 julio 2012. Eŭropa Esperanto-Kongreso en Galivo, Irlando. 9-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio. Inf.: Eŭropa Esperanto-Unio

28 jul/4 aŭg. 2012. 97-a Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo, Vjetnamio.

5 - 12. Aŭg. 2012. 68-a Internacia Junulara Kongreso en Tenri, Japanio.

18/25 aŭg. 2012. 79-a Itala E-Kongreso. Mazaradelvalo (Sicilio).

julio 2013. 98-a Universala Kongreso de Esperanto en Reykjavík, Islando

**H.E.F.**

## LA VENONTA HISPANA KONGRESO, EN ALMAGRO.

La venonta Hispana kongreso de Esperanto okazos en la urbo Almagro (Ciudad Real), de la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo 2012 (en la "ponto" de majo). Almagro estas urbo tre interesa turisme, kiu gastigis IRon en 2010, kun ĝenerala kontentigo.

Iom post iom aperos pluaj informoj. Dume, oni jam povas rigardi iujn en:
http://www.esperanto.es/hef/esperanto/52-Noticia/429-kongreso-en-almagro
http://www.esperanto.es/hef/kongreso

*(José Antonio del Barrio, Prezidanto de HEF. 20/11/2011)*

## Libro kun kurioza titolo.

En la madrida Librejo "*La Malatesta*" (reta kaj fizika) eblas akiri hispanlingvan libron kun tre kurioza kaj longa titolo: "*Por qué tus hijos deberían comer más coliflores y aprender un poco más de Esperanto. Aproximación a una lengua auxiliar y apátrida*". Joan Català Piñón.

"Iniciada y dada a conocer por el políglota Zamenhof. un oculista polaco de origen judío, la lengua internacional Esperanto es una gran desconocida para la mayoría de personas; sin embargo, es digna de reconocimiento y debería ser tratada y estudiada al menos un año en todos los colegios del mundo durante la enseñanza básica, pues es una solución totalmente viable para la comunicación internacional y en tan solo un año todos los niños del mundo podrían comunicarse a partir de esta segunda lengua que podrían aprender muy fácilmente. ¿Te imaginas las consecuencias que esto tendría para el futuro de la humanidad si todos pudiésemos entendernos sin intermediarios?...

http://www.lamalatesta.net/product_info.php/products_id/4294

*(Darío Rodríguez. 08/08/2011)*.

## Esperanto en la aŭtobusoj de Santander.

En los monitores de TV que pone a servicio del público el Servicio Municipal de Transportes Urbanos, al menos durante esta semana, estan pasando un reportaje titulado "El Esperanto en la actualidad".

*(Cecilia Calvo. Kantabra E-Asocio. 19/08/2011)*

## Kanalo de HEF en Jutubo.

Hispana Esperanto Federacio vigligis sian kanalon de videoj en Jutubo (Youtube), per diversaj pecoj filmitaj en la 70-a Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Sankta Laŭrenco Eskoriala. Spektu ilin en la adreso: http://www.youtube.com/user/esesperanto.
Aliajn videojn eblas spekti en la kanaloj Ekstremoj, SvenaDun kaj Sinkopo. Ligoj al ili aperas en la ĵus menciita adreso.

*("Nia Voĉo", organo de Madrida E-Liceo. Sept. 2011)*

## Eŭropa tago de la lingvoj.

La 26a de septembro estis festata jam dekafoje la Eŭropa Tago de la Lingvoj, kreita laŭ iniciato de la Konsilio de Eŭropo kun la apogo de la Eŭropa Unio. Diversaj institucioj kaj asocioj organizis agadojn favore al lingva diverseco en Eŭropo, inter kiuj kelkaj Esperanto-organizaĵoj. Tamen, la reeĥo kaj la iniciatemo estis ĉijare ne tre granda, kaj specife en Hispanio tre malmultaj asocioj montris substrekindajn aktivaĵojn.

*(“Nia Voĉo”, organo de Madrida E-Liceo. Okt. 2011)*

## Alia libro kun kurioza titolo.


**Esperanto**
Rodrigo Fresán
Un lunes por la mañana Federico Esperanto, músico de treinta y cinco años, atormentado, entre otras muchas cosas, por el estigma de su apellido y la imagen de James Dean intuye que la semana que está por afrontar va a ser una de esas semanas. Y no se equivoca.
**192 págs. • 16,90 € • Mondadori**

Jen recenzo pri tiu-ĉi libro aperis en katalogo de “Librejoj L” (jaro 9. Num. 27. Somero 2011).

Ne nur okulfrapas la ne ofta titolo de la libro, sed ankaŭ kion diras la recenzisto:

“*Federico Esperanto, 35-jara muzikisto, turmentita, inter multaj aliaj aferoj, pro la hontigmakulo de lia propra familnomo*”.

Ne tro favora opinio pri Esperanto, ĉu ne?.

## Madridaj E-kursoj en “Facebook”.

Mi ĵus kreis paĝon pri la esperanto kursoj en Madrido en vizaĝlibro (fejsbuko). Trovebla per: **Cursos Esperanto En Madrid**.

*(Pedro Hernández. 04/10/2011)*

## Esperanto en "Real Orden de 27.jul.1911".

Multaj jam scias pri oficiala permeso en Hispanio en 1911 por instrui esperanton en oficialaj lernejoj. Iom simile al rezolucioj de UNESKO, la enhavo ne estas tro favora al Esperanto. Tamen, estis gravaj atingoj en la oficiala mondo kaj permesas iel propagandi Esperanteme. Plurfoje, mi mencias la “Real Orden de 27 de julio de 1911 del Ministerio de Instrucción Pública autorizando la enseñanza del esperanto” kaj "declarando mérito oficial el diploma de aprobación de su estudio". Referencoj kaj ligiloj por konsulti en la reto:

Dirección General de Primera enseñanza.- Autorizando la explicación de cursos del idioma Esperanto, en los Establecimientos oficiales de enseñanza, por Profesores designados por los Asociaciones esperantistas.
Gaceta de Madrid núm. 227, de 15/08/1911. Página 472: TIFF (Referencia 1911/06581)

Subsecretaría.- Autorizando la explicación de cursos del idioma Esperanto en los Establecimientos oficiales de enseñanza, por Profesores designados por las Asociaciones esperantistas.
Gaceta de Madrid núm. 283, de 10/10/1911. Página 93: TIFF (Referencia 1911/07857)

*(Lorenzo Noguero. 05/10/2011)*

## TRA LA MONDO ...

## La plej suda ZEO.

Laŭ (parta) informo de Henri Masson:

Mi fidis je la listo de ZEOj de Vikipedio kaj propra serĉado por prepari virtualan ekspozicion pri Zamenhof-Esperanto Objektoj kaj poste fizikan. Hazarde de interreta serĉado, mi malkovris, ke la plej suda ZEO estas fakte malgranda "Esperanto (Insulo)", angle "Esperanto Island", ĉine 世 界语岛. Tio estas la tri ĝis nun ekzistantaj lingvaj versioj pri ĝi en Wikipedia, kvankam ŝajnas ke la nomon atribuis bulgaraj esploristoj : "остров Есперанто" (Ostrov Esperanto).

Ĝi situas en Antarktiko. Senglacia kaj roka, ĝis altas je 290 metroj kaj etendiĝas sur 950x900 metroj.

Rimarko de Darío: La Esperanto-Insulo estas videbla ekde la spaco (kvankam ne tro bone) per Google Maps; petu: Esperanto Island, Antartida (elektu la supre dekstran opcion "Satelite").

*(Darío Rodríguez. 27/08/2011)*

## Alia insulo "Esperanto".

Nu, reale ĉi tiu antarkta insulo ne estas la unua insulo ESPERANTO en la mondo. Laŭ informo de "Enciklopedio de Esperanto" la urbo Rahovo, nuntempe en la bulgara lingvo Oryahovo, cedis al la esperantista grupo de la urbo 108-hektaran insulon en la rivero Danubo. Verŝajne la nomo ankoraŭ estas tiu, char estas eble vidi la insulon, sub tiu bela nomo, che Google Earth. Serchu la urbon Oryahovo en Bulgario kaj fronte al la urbo Leskvotets troviĝas tio kio Google Earth nomas "Esperanto island". Eĉ videblas fotografaĵoj. La insulo estas belega, eĉ aperas io simila al plaĝo.

(*José María Rodríguez Hernández. Kordovo. 28/08/2011*)

## Incendio.

Pasintan nokton, 18a-19a de septembro, okazis terura katastrofo ĉe VINILKOSMO / EUROKKA.

La ekzercejo n-ro 7 kie ekzercis 3 rokaj bandoj kaj la stokejo de Vinilkosmo / EUROKKA, kie estis la sonsistemo, stokita materialo por la studio, instrumentoj kaj la plej granda parto de la ko-diskoj de Vinilkosmo, estis detruitaj de incendio.

*(Miguel Gutiérrez Adúriz. 19/09/2011)*

## Aĉeteblas long-filmo dublita en Esperanto.

Attack of the Moon Zombies, *DVD-oj*, Saint Euphoria Pictures, 2011. Hororfilmo laŭ la maniero de la 1950-aj jaroj, dublita en Esperanto. Prezo: 9.00 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo*: http://katalogo.uea.org?inf=8676
(anglalingva recenzo ĉe http://www.sainteuphoria.com/aotmz.html )

*(Darío Rodríguez. 28/09/2011)*

## Evoluo de la membronombro de UEA.

La 15-an de septembro UEA havis 5204 individuajn membrojn. Samdate en 2010 la nombro estis 5224. Lau la kategorioj la distribuo estis (inter krampoj la nombroj samdate en 2010):
Membro kun Gvidlibro 346 (438)
Membro kun Jarlibro 1385 (1158)
Juna MJ 239 (183)
Membro-Abonanto 2194 (2378)
Juna MA 88 (110)
Dumviva Membro 787 (795)
Juna DM 15 (19)
Dumviva Membro kun Jarlibro 78 (74)
Juna DMJ 9 (9)
Honora Membro 56 (53)
Honora Patrono 7 (7)

La 1-an de aprilo mi raportis, ke tiam estis 166 membroj malpli ol unu jaron pli frue. Fine de majo la diferenco estis 90 kaj ankaŭ poste ĝi ade malkreskis. Nun ĝi ankoraŭ estas 20. La fina nombro en 2011 eĉ povos iom superi la pasintjaran, sed same eblas, ke ĝi estos malpli granda. La fina nombro en 2010 estis 5288. Mankas do ankoraŭ 84 membroj por atingi la samon.

En majo mi alvokis por donacoj al Fondaĵo Canuto, precipe por povi remembrigi esperantistojn el Kubo, kiuj en 2010 fariĝis membroj lige kun la Havana UK. Tuj reagis eksa estrarano: "Mi petas, ke vi utiligu 50 (kvindek) eŭrojn el mia konto por Fondaĵo Canuto cele ĉefe al remembrigo de Kubanoj." Sufiĉus du similaj mesaĝoj por kovri la nunan breĉon de 20 membroj, ĉar unu kotizo de Membro kun Gvdilibro laŭ la tarifo B estas 5 eŭroj. En Kubo la membronombro estas ankoraŭ 74 sub la pasinta jaro. Kontraŭ tiu negativa kongresa efiko estas la kreskoj en Rusio (+56), Litovio (+25) kaj Ukrainio (+10), kaŭze de UK en Kopenhago kaj IJK en Kievo.

En majo mi menciis la landojn, kiuj havis malpli da membroj ol en 2010. Intertempe havas pluson Danio kaj Svedio (+5), Finnlando (+3), Brazilo, Italio kaj Nederlando (+2), kaj Britio (+1). Same multe kiel en 2010 havas Grekio, Hispanio, Irlando, Islando, Luksemburgo, Norvegio kaj Svislando.

Kompare kun 2010 ankorau postrestas Kanado (-18), Usono (-17), Francio kaj Israelo (-15), Kroatio kaj Meksiko (-11), Belgio (-9), Pollando (-8), Japanio (-6), Australio, Germanio kaj Nov-Zelando (-2), Austrio kaj Slovenio (-1).

*(Osmo Buller, Ĝenerala Sekretario de UEA. 16/09/2011)*

## Literatura Nobel-premio kaj alia informo.

Eble vi jam rimarkis ke en iuj informoj pri la lasta literatura nobelpremiito oni mencias ke liaj verkoj estas tradukitaj "eĉ" al Esperanto. Ekzemple: http://www.publico.es/culturas/400339/el-premio-nobel-da-voz-al-poeta-del-silencio
Legu pri tio ekzemple en la komentoj afiŝitaj en Libera Folio:

http://www.liberafolio.org/2005/persone/forpasis-franko-luin-kreinto-de-e-librejo

Kaj profitante la mesaĝon, kaj por ne inundi la liston, jen alia tute senrilata novaĵo: hodiaŭ diversaj instancoj festan la 75-an datrevenon de la unua vaska registaro. http://www.elcorreo.com/vizcaya/v/20111007/politica/anos-autogobierno-20111007.html

Memoru, se vi havas la ŝancon informi pri tio, ke du el la membroj de tiu registaro, Juan Gracia kaj Santiago Aznar, estis aktivaj esperantistoj (mi plurfoje blogis pri tio, kaze ke iu volas refresigi la memoron).

*(Toño del Barrio. 07/10/2011)*

## E-kursoj en universitatoj - Kompilado - Ghisdatigo !

Nun mi komencas ĝisdatigi mian kompiladon pri ***E-kursoj oficiale organizataj en universitatoj kaj superaj*** [postmezgradaj] ***altlernejoj***. La sciigoj mi devus havi **ĝis** la **3-a de decembro** 2011.

Mi esperas ke, denove, vi konsentos helpi

- ĉu konfimante la sciigojn pri via kurso de la lasta kompilado (januaro 2010), kiun eblas konsulti i.a. ĉe
    - http://www.egalite.fw.hu/
    - http://www.ipernity.com/blog/32119/234890

- ĉu ĝisdatigante tiujn sciigojn.

*(Germain Pirlot. 09/10/2011)*

## Nova versio de la tradukilo de la hispana al Esperanto.

Mi ĝojas informi vin, ke novan version de la aŭtomata tradukilo de la hispana al esperanto oni povas uzi ĉe la adresoj http://apertium.saluton.dk kaj http://traduku.net

Tiu ĉi versio enhavas multajn plibonigojn rilate al la antaŭa, kvankam ĝi estas evidente malperfekta (kiel ĉiuj aŭtomataj tradukiloj, cetere). Teknikajn detalojn eblas legi ĉe http://wiki.apertium.org/wiki/Spanish_and_Esperanto/Notoj_pri_versioj (en la hispana lingvo).

Mi profitas la okazon por memorigi al Vikipediistoj, ke eblas uzi aŭtomatan tradukadon por helpi krei aŭ plibonigi artikolojn. Ekzistas ege helpa utilaĵo por tio: http://vikitraduko.saluton.dk:8080/vikitraduko/

La boneco de aŭtomataj tradukiloj dependas de la kvanto de laboro investita en ili. Se iu deziras kunlabori en la plibonigo de ĉi tiu Apertium-tradukilo aŭ de iu alia, aŭ krei tute novan, tiu ne hezitu kontakti min. En tiu okazo, la artikolo trovebla ĉe http://www.teleskopo.com/2011.htm en kiu iom detale estas klarigite, kiel funkcias la aŭtomata tradukilo, estos utila; cetere ĝi povas esti interesa entute, por kiu ajn scivolanta pri aŭtomata tradukado.

*(Héctor Alòs i Font. 24/10/2011)*

**LA ESPERANTO-GRUPO DE BILBAO DEZIRAS AL VI ĈIUJ KIEL EBLE PLEJ DA FELIĈO DUM LA NOVA JARO 2012.**